



# BOLETIN

DE LA FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA

JULIO  
1952  
RUZafa. 7  
VALENCIA  
(ESPAÑA)

## VALENCIA, COLMENA ESPERANTISTA

Se acerca el momento en que el trabajo de todo un año, el conjunto de esfuerzos y sacrificios, está a punto de rendir su fruto. Durante doce meses, los esperantistas españoles, agrupados en sociedades locales o aislados y diseminados en pequeñas ciudades y pueblos, van a sentir la íntima satisfacción de reunirse, para conocerse por primera vez o para reanudar viejas amistades, sin descuidar el detalle de que, por encima de esas emociones de afecto individual, hay que efectuar el balance de las realizaciones alcanzadas y de las aspiraciones todavía no logradas.

Seguramente, como en otras actividades, habrá optimistas que, en rosado marco, encuadrarán los resultados obtenidos, como satisfacción suma de sus esfuerzos. En cambio, habrá quienes con tintes sombríos presentarán la escualidez del resultado de sus actividades o, más bien dicho, de las actividades de otros...

Si meditamos y consideramos imparcialmente los hechos, hemos de convenir en que la marcha es lenta—desesperadamente lenta—para quienes, como nosotros, luchan con entusiasmo y sin desmayos por alcanzar la suprema aspiración, que es el triunfo del Esperanto en los medios oficiales y en aquellos otros donde vive y se desenvuelve el gran público. A juzgar por esa lentitud, nuestro objetivo está lejos, sideralmente lejos de nuestro alcance: el absoluto desinterés de la gente, por el problema lingüístico, corre parejas con la injustificada prevención de quienes deben conocer el problema para aplicarle una solución eficaz y correcta.

Tendríamos motivos sobrados para desesperarnos y para desilusionarnos, dejando la solución del asunto para otras generaciones más preparadas y para otros mentores mejor informados. Nadie podría reprocharnos: ni la masa gregaria, que nada hace y todo lo espera del misterioso poder de alguna varita mágica, ni las autoridades académicas que creen no poderse pronunciar más que en virtud de una clamorosa demanda de millones y millones de convencidos, lo cual no es precisamente lo que requiere la responsabilidad de su ineludible función rectora.

Pero, a pesar de tanta incompreensión, no podemos ni queremos arriar nuestra bandera; porque, alentados por el fervor de una selecta minoría, representativa de todas las capas sociales, creemos que debemos seguir laborando por el supremo ideal de que los hombres de todo el mundo dispongan de un segundo lenguaje, neutral, expresivo y fácil, común para todos; porque estamos plenamente convencidos de que el Esperanto es el idioma que reúne las debidas cualidades para resolver el tremendo caos lingüístico, causa de una gran distancia espiritual, más evidente hoy que nunca, cuando tanto y tanto se alardea de técnica y maquinismo.

## BENVENON AL VI. KARA KONGRESANO!

Y estamos convencidos de la eficiencia del Esperanto, así como de sus virtudes, porque hemos podido experimentar, en nosotros mismos, que su uso instruye y deleita, al par que dignifica y ennoblece. Por lo tanto, habiendo comprobado tan bellas cualidades, puestas bien de manifiesto con motivo de numerosas y recientes visitas, hemos de ser nosotros ahora los que nos veamos y nos saludemos.

Así, pues, esperantistas españoles, sed bienvenidos en Valencia, punto de cita y reunión, a la que, como diligentes abejas, habéis acudido para aumentar el enjambre y aunar los esfuerzos, para que resulten más fecundas las tareas en pro de la necesaria cohesión interna y de la máxima consideración externa.

Sea, pues, el 13.º Congreso Español de Esperanto la colmena donde, con serena laboriosidad, se elabore por todos y para todos el plan decisivo para que, en un próximo futuro, tenga el Esperanto la importancia que merece, por todas las tierras hispanas, como consecuencia de la fuerza que irradian nuestra asamblea nacional desde Valencia, la ciudad laboriosa y jovial que, según la letra de su himno, siempre «supo luchar para ofrendar nuevas glorias a España...»

# LAŬTPAROLILO DE LA ESPERANTISTARO

Bedaŭrinde, pro manko de spaco, ni devas mallongigi sufiĉe amplekse ĉi tiun tre interesan artikolon. — Red.

## AMIKE BABILANTE INTER NI

Ricevinte la numeron de BOLETIN, en kiu subtenas sian vidpunkton S-ro Bosch, ankaŭ mi deziras konigi miajn ideojn pri la *Interna Ideo* ktp. Interese estas, ke samtempe kun ĉi tiu disputo okazas tute samspeca disputo en la movado Interlingue (Occidental); se S-ro Bosch protestas kontraŭ la vorto *samideano*, en «Cosmoglotta» S-ro Frodelfund protestas kontraŭ *coidealist*, traduko je la esp. esprimo. Esence, la argumentoj estas similaj: oni tro emfazas la literaturon, la kongresojn (kvankam tiuj du aferoj ne ekzistas en Interlingue), kaj la *Internan Ideon*. Tiuj homoj volas belan aferon: praktikan aplikadon de Esperanto en la scienco kaj komerco. Neniu povas ja nei, ke tiu idealo estas bona. Ni nur rajtas demandi kial tiel ne estas, ke oni uzas la lingvojn en tiuj praktikaj rilatoj. Mi kredas ke la solvo montros ankaŭ, kial Interlingue ne gajnis multajn proponantojn, kaj kial ni ne bezonas timi, ke tiu aŭ Basic English iam superos Esperanton. Konstatu la fakton, ke preskaŭ ĉiu, kiu lernas Esp-on, estas monoglototo (unulingvulo). La monoglototo estas allogita per belaj frazoj pri facilego, tuja uzebleco, ktp. Sed tuj, komencante kurson, la monoglototo trovas ion: lerni lingvon signifas mallerni la propran.

Ne nur temas pri novaj vortoj—tiujn oni facile kaj rapide lernas—ne temas pri novaj gramatikaj, ĉar en neniu interlingvo estas gramatikaj tute fremdaj al iu nacia lingvo. Ne. Temas pri tio, ke oni devas lerni sin esprimi klare, logike, kaj laŭ nekutima maniero. Oni devas eviti idiotisinojn, kiuj estas la plej granda parto de iu ajn nacia lingvo; oni devas memori, ke multaj aferoj antaŭe supozitaj *naturaj* estas arbitraj kaj ne uzeblaj en la lingvo. Kaj oni devas lerni kompreni la erarojn de aliaj personoj. La monoglototo ne komprenas tion, lernante la unuajn lecionojn. Poste, subite eklernigas tiu fakto, kaj la studento eksigas el la kurso! Ne kulpas la lingvo, ne kulpas la instruistoj, kulpas la fakto ke la studento estas monoglototo. Kio distingas, do, Esperanton kontraŭ aliaj projektoj? Kial ekzistas nur unu projekto vivanta

ekster la esperanta mondo, kaj eĉ tiu povas aperigi nur unu dumonatan duone mimeografitan internacia gazeton, kaj ĝi povas montri tute neniajn sukcesojn en iu praktika sfero? Ni rigardu la simplajn faktojn: Mi konas gravan kemiiston. Li interesigas pri internacia lingvo. Mi paroladis al li pri Esperanto. laŭ lia peto. Post kelka parolado li diris: «La fakto plej grava, tamen, estas ke faka laborado en via lingvo estas ankoraŭ amatora; aperas artikoloj pri kemio, jes, sed ili estas nur resumartikoletoj. Kiu verkas en Esperanto (aŭ iu alia projekto) perdas sian verkon». Sed, kiel oni povas aperigi gravajn artikolojn sen gravaj fakuloj? Kaj kiel akiri gravajn fakulojn sen la tuja utileco de la lingvo? Jen terura rondo.

La respondo estas, ke nepre oni devas havi ion pli ol la teknikan laboradon. Ni devas povi diri al la fakulo: jen, ni havas ĉion por vi. Jen, vi abonas gravan anglan literaturgazeton, kiu aperas ĉiumonate kun ducent paĝoj kaj centoj da reklamoj, do, vi povas samkoste aboni samgrandan en Esperanto. Jen, vi iras al granda angla lingva kunveno de klubego, do, jen internacia esperanta kunveno; nur kiam S-roj Bosch ktp. memoros, ke fakuloj bezonas ion krom la fakajn verkojn, ili komprenos la veran staton. Kial hotelisto lernu Esperanton (aŭ Interlingue aŭ alian lingvon), tiel elspezante monon kaj multan tempon, kiam eĉ nur plej elementa scio je angla lingvo venigos pli multajn turistojn ol li povos prizorgi? La *praktikistoj* mem estu praktikaj! Oni pravas, kompreneble, protestante kontraŭ mistiko en la lingvo. La Interna Ideo kun la signifo: «mekanika interkompreniĝo de popoloj» estas bonega. Sed kun ombroj de Hilelismo ĝi timigas multajn. Sed bona literaturo, plejparte originala, kaj aro da literaturaj gazetoj devas esti la plej centra parto de nia lingvo. Kaj, laŭ la spirito de S-ro Bosch (kiu ĉe la supro de sia artikolo avertis kontraŭ ŝoko pro la enhavo) mi avertu, ke oni ne tro krii se mi diras, ke ni mem tre ofte pekis sur la literatura kampo, eldonante ekzemple la lingvistike interesan, sed praktike teruran, Kalocsay-tradukon je «Infero» (kiun oni ne povas legi, ne relernante la tutan lingvon kaj tute novan vortaron!) kaj «La Dektria Mortis» pri kiu

# FACETAS DEL MOVIMIENTO ESPERANTISTA

- PORTUGAL.—El diario «República», del 30 de Mayo, publicó el artículo póstumo del conocido escritor y periodista Rocha Martins, sobre «O Esperanto em Portugal».
  - FRANCIA.— El Congreso Internacional de Esperantistas Católicos para 1953 se celebrará probablemente en Lourdes, por lo que la reunión tendrá un marco muy específico en este lugar de peregrinaje mundial. «Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj» ha sido aceptada como institución colaboradora de UNESCO. La Liga ya comprende sociedades afiliadas en siete países, y en otros dieciocho tiene socios individuales.
  - NORUEGA.—Hasta final de Mayo, los adheridos al Congreso Mundial de «Universala Esperanto Asocio», que va a celebrarse dentro de poco en Oslo, eran ya cerca de dos mil, de 31 países y naciones diferentes, que se entenderán entre sí perfectamente.
- La Compañía de Navegación entre Larvík (Noruega) y Frederikshavn (Dinamarca) ha publicado en Esperanto unos folletos de las condiciones y precios para el transporte de viajeros y vehículos entre ambos puertos, en su bello y moderno buque «Peter Wessel».
- ALEMANIA.— A la «1.ª Internacia Konferenco de Esperantistaj Studentoj kaj Altlernejanoj» (17 al 24 de Agosto en Schluchsee), representando al Japón, donde tanto desarrollo tiene el Esperanto en los medios universitarios, asistirá el Profesor E. Eganí, famoso científico japonés. En la sesión final de la Conferencia hablará el distinguido samideano, Doctor G. Canuto, rector de la Universidad de Parma (Italia).
  - YUGOSLAVIA.— En el «Instituto para Ciegos», de Zemun, se ha adoptado la enseñanza obligatoria del Esperanto para todos los alumnos, desde el cuarto curso de la escuela elemental hasta el quinto de bachiller, a razón de tres horas semanales.

El 38 Congreso Universal para 1953 tendrá lugar en Zagreb, capital de Croacia.

- ITALIA.—Se están llevando a cabo los preparativos de organización del 25 Congreso Nacional de Esperanto, que se celebrará en Bologna. El Presidente de la Comisión Organizadora, Abogado del Estado, señor Bagnulo, ha recibido la aprobación del Excmo. Sr. L. E. Einaudi, Presidente de la Nación; como Presidente honorario; también ha presentado su valiosa adhesión el señor De Gasperi, Presidente del Consejo de Ministros, El Congreso será inaugurado por el Ministro de Instrucción Pública, señor Segni, y en él se estudiará la introducción del idioma auxiliar en las escuelas italianas, como consecuencia inmediata de la buena acogida dispensada al respecto por el señor Segni.

Desde el 7 de Mayo, Radio - Roma transmite sus emisiones en Esperanto, de 19 a 19:20 horas (oficial española) puntualmente dos veces por semana: miércoles y viernes.

La «XXX Feria Internacional de Padua» (7 al 22 de Junio) editó un cartel de propaganda con texto en Esperanto, idioma empleado también por la Oficina de Propaganda.

ESPERANTO kaj FRANCA ESPERANTISTO ne povis ankoraŭ kompetente kaj fine decidi, ĉu temas pri lingve aĉa aŭ majstra verko.

Ne, ni ne «montru al la publiko per frapaj ekzemploj, ke la internacia lingvo Esperanto permesas ŝpari monon, pliigi la profitojn...», ĉar tiel ne estas. Presi en Esperanto kostas ĉie pli, ne malpli, ol en la nacia lingvo. Dudektaga kurso pri angla lingvo ĉie liveras pli multajn profitojn ol dekjara kurso pri Esperanto. Profiton oni ne povas akiri por Esperanto, kaj ne povos ĝis oni (t. e. la publiko) propravole uzos ĝin; kaj tio okazos nur kiam la publiko uzados ĝin jam por la kulturaj kampoj. Mi diras: forprenante la literaturajn gazetojn, forprenante la kunvenojn kaj la korespondadon kaj la konkursojn, oni forprenas ankaŭ min, kaj kun mi tiom da esperan-

tistoj ke restos nur du-aŭ-tri-cent; kaj ni havos, anstataŭ niajn belajn revutojn, belan duone mimeografitan dumonatan bultenon, kiel tiun, kiun oni apenaŭ legos sen oscedo, kaj kiu edifas la legantojn per pseudo-teknikaj artikoloj, tre mizere plendante ĉar la kontraŭantoj rifuzas konstati la valoron de Esperanto, kaj preferas por siaj profitdonaj okupoj uzadi praktikan lingvon, kaj guste nun la nomo de tiu lingvo estas kvinlitera kaj komenciĝas kaj finiĝas por a. Se iu volas vidi kiel aspektas tiu stato, nur skribu al «Interlingue-Institute», Cheseaux s/Lausanne, Svislando, kaj tiu centreto ĝojos sendi al vi senpage pruvon pri la rezultoj de la dezirōj de S-roj Bosch, Eŭma, kaj aliaj...

DONALD R. BROADRIBB

791 South Avenue  
Rochester 20 (New - York) Usono

JUGO

La subskribintoj, elektitaj de la Organiza Komitato por juĝi la verkojn prezentitajn al la Literatura Konkursko, okaze de la XIII<sup>a</sup> Hispana Kongreso de Esperanto, deklaras:

La tri membroj de tiu Jugantaro, kiuj aparte estis legintaj ĉiujn verkojn, zorge ekzamenis kune la aferon, kun la celo plej konsciencie plenumi la taskon al ili difinitan.

Post ĝenerala pridiskuto kaj oportuna konsulto al la notoj de ĉiu membro, kaj releginte en la kunveno la verkojn, kies valoro konsilis pli profundan studon, por justa decido, la Jugantaro:

konstatinte la grandan sukceson de la Konkursko, laŭ nombro de konkurantoj, kaj la altan nivelon de la verkoj;

bedaŭrante, ke estas disponeblaj nur DU premioj, laŭ la kondiĉoj regulantaj la konkuron, unuanime konsentis en la sekvanta

JUGO

POEZIO: Premio al S-ro Luigi Minnaja, el Romo, pro la verko MIA PREGO (originala)

PROZO: Premio al S-ro Adolfo A. Nunes, el Lisbono, pro la verko LA FRENEZULO (originala)

La Jugantaro proponas al la Organiza Komitato la disdonon de aldonaj premioj, kiel rekompencan, al la verkoj meritantaj specialan estimon, kies titoloj kaj aŭtoroj estas jenaj:

- POEZIO {
- LA KONSTANTA KORO (originala) de S-ro R. Rossetti.
  - MI NE PRETENDAS FLORON... (originala) de S-ro William Auld.
  - LARMEFORĜITAJ FLUGILOJ (originala) de S-ro Vincenzo Musella.
  - ĈIO MORTAS (originala) de S-ro A. Núñez Dubus.
  - RIMO (G. A. Becquer), traduko de S-ro José Martínez.
  - PURAMO (originala) de S-ro F. Vilá
- PROZO {
- KAPRICO (Thor Vilhjalmsen), traduko de S-ro Baldwin B. Skaffell.
  - ĈU LI? (Guy de Maupassant), traduko de S-ro Pierre Royer.
  - INTERPAROLADO KUN LA DIABLO (C. Smirnensky), trad. de S-ro Luigi Frateschi
  - LA OVALA PORTRETO (Edgar Allan Poe), traduko de S-ro John Cresswell.
  - MALĜUSTA NUMERO (originala) de S-ro Christian Hongaard.
  - LIA SONĜO (originala) de S-ro Ernesto Martínez.

Tiu ĉi listo ne ordigas la kvaliton de ĉiu verko, sed konsideras ĉiujn samrangaj.

La Juĝantaro opinias, cetere, ke ankaŭ estas menciindaj la sekvantaj verkoj:

- POEZIO** {
- ĈIUJN NOKTOJN... (originala) de S-ro Vinko Bitenk.
  - LA OKULOJ DE L' VIRINO (F. Coppée) traduko de S-ro L. Thévenin.
  - ARGENTAJ NUBETOJ (originala) de S-ro Ĵiri Korinek.
  - LA AMBIGUA DIINO (originala) de F-ino M. Boulton.
  - HISPANAJ MEMOROJ (T. Kristensen) traduko de S-ro P. Thorsen.
  - JURO ESPERANTISTA (originala) de S-ro E. Pfeffer.
  - KAMPARA TAGIĜO (originala) de Benito Losada.
  - MIA SONETO (originala) de L. Mimó Espinalt.
- PROZO** {
- LA PASERO, KIUN ONI NE DEVIS RIGARDI (originala) de S-ino M. Halbedl
  - KOMEDIO (originala) de S-ro Donald R. Broadribb.
  - LA RETROVITA TEMPLE (originala) de S-ro A. Ribot.
  - TUTA VERO (P. Gilles Veber), traduko de S-ro Henry Vis.
  - LA ORFINO (originala) de S-ro G. Wagner.
  - LA ESTIMATA PRELEGANTO (S. Carmiggelt), traduko de S-ro J. M. J. Driessen
  - LA RATKAPTISTO (originala) de S-ro Karl Heinz Gerth.

La Juĝantaro gratulas la Kongreson pro la brila akcepto, fare de multenombraj esperantistoj el pluraj landoj, al la Literatura Konkurso.

La abundo de materialo, ĝenerale tre bona, postulis gravan atenton kaj igis malfacila la taskon juĝi. Ĉiuj tri membroj de la Juĝantaro dankas pro la honoro, kiun al ili faris la Organiza Komitato, komisiante ilin por tiel respondeca laboro. Ili klopodis fari ĝin konseie kaj objektivite. Laŭ tia konvinko, ili subskribas ĉi tiun akton en Valencio, la 18<sup>a</sup> de Julio en la jaro 1952<sup>a</sup>

*Rafael Herrero — Luis Hernández — Vilhelmo Bosch.*

**STATISTIKO:** La konkurson partoprenis verkistoj el dek-ses jenaj landoj:

Anglio - Aŭstrio - Ĉeĥoslovakio - Danlando - Francio - Germanio - Hispanio - Islando  
Italio - Jugoslavio - Nederlando - Portugalio - Skotlando - Usono - Urugvajo - Venezuelo

Verkoj ricevitaj ĝustatempe: POEZIO: 51 - PROZO: 22 - Entute: 73  
Originalaj: 49 - Tradukaj: 24

**Noto.**—Post la limdato, venis ankaŭ kelkaj pliaj verkoj, kiujn bedaŭrinde oni ne povis jam akcepti.

## INTER LA PROZO DE LA ESPERANTISTA GAZETARO

Ŝvito fluas abunde tra ĉiuj poroj de la korpo, kvazaŭ la homoj estus pupoj el vakso, kiuj, fandigante sub la inkandeskaj sagoj de la suno, oferas sin al la rigora premo de ĉi tiu absoluta somera suvereno. Sed, ŝvito perlas nun sur mia frunto, ne ja nur pro varmo, ĉar multe da zorgoj kaj multe da okupoj mi havas, preparante mian vojaĝon al la granda kunveno de la hispana esperantismo, en la centro mem de nia tutlanda movado. Tie, sub plafono de salonoj, kie oni diskutos kaj eble eĉ disputos; tra avenuoj kaj aleoj tegmentitaj de akacioj aŭ palmoj, kie oni promenos, oni babilos aŭ... eble oni kveros, en perfekta agordo, de paro al paro; kaj, fine, en la apudmara pavilono, kie oni festenos kaj oni deklamos, dum literatura festo, la medio fariĝos agrabla kaj, tute certe, la varmo mildiĝos — almenaŭ la varmo vetera! — ĉar pri tiu alia de la hispana temperamento malfacile estas respondeci, kiam bolas pasio en diskuto, kiam logus beleco de incite-provoke proksima virino, aŭ kiam patoso kaj vervo de alta beletro transportas la animojn en flaman staton de viva epopeo, vokanta al plenumo de plej superaj kaj mirindaj heroaĵoj.

Jen kia, do, estos la spirita atmosfero al kiu diligente mi nun min preparas, por persone studi homajn karakterojn, en ties naturaj reagoj, ĉar jam tro longe ilin mi analizis, laŭ turnoj kaj frazoj de artikoloj en gazetoj kaj revuoj, kie la stilo ofte vatas la pikemon de la intenco, kiun certe pli nude la buŝo ekmontras en rekta alparolo; ekzemple, kiam, okaze de esperantista renkontiĝo, oni grumblos aŭ plendas, ke la organizantoj ne atendis ĉe stacidomo, aŭ ke la ĉambro en hotelo situas en tro alta etaĝo... Tamen, espereble, oni neniel grumblos se grava dokumento okupas hodiaŭ la spacon, kiun ordinare uzis por mispoezie recenzi la prozon de niaj gazetoj

LA LEGEMA KOBOLDETO

# ESPERANTO EN OSLO, LA SKANDINAVA PERLO!

*La esprimo de niaj sentoj preskaŭ ĉiam estas absurda.* PAUL VALERY

## ANKORAŬ PRI S-RO KLEM

S-ro Klem, la advokato, renkontis surstrate amikon kun tre pala vizaĝo. Demandate pri tio, li respondis:

—Mi bonfartas, sed ankoraŭ mi statas sub la impresado de terura sonĝo, kiu suferiĝis min dum la lasta dormado. Jen, mi troviĝis sen armiloj en afrika dezerto, kie furioza leono persekutis min; pro elĉerpi-taj fortoj, mi falis teren, la bestego tuj kaptis min sub siajn ungegojn, mia karno estis ŝirata... terura morto estis neevitebla... kiam la voĉo de mia edzino, vekante min, liberigis mian animon de tiel kruela aventuro. Al tio, S-ro Klem siatempe respondis:

—Ho, ankaŭ mi havis amaran sonĝon hieraŭ nokte: Sur florplena paradizo, bela junulino petoleme persekutis min; ŝia delikata maneto trafis mian dekstran brakon, skuetante ĝin... Kaj la voĉo de mia edzino ekvekis min, dirante: «Klem, ellitigu, ĉar jam estas la oka matene!»

En jarkunveno de kolegoj, ĉeestas S-ro Klem, por tagmanĝi en fama restoracio. Jam ĉe la fino, unu el la najbaroj demandas al nia amiko, ĉu li manĝis bone.

—Ne, tute ne, diris S-ro Klem, se la supo estus tiel varma, kiel la vino; la vino tiel maljuna, kiel la meleagro; kaj la meleagro tiel karnoriĉa, kiel la kelnerino... vere ja tiel estus bonega la tuta manĝo!

EMILIO PRADES

## SFINKSA ANGULETO

KVARTETO DA LITEROJ

X X X X

*Kvar nomoj de literoj (silaboj) devas doni la nomon de speco de rezino. Cetere, ripetante aŭ kombinante tiujn silabojn, oni povos formi pliajn diversajn substantivojn.*

Por rajti al la premio, kiu estos eksterordinara, sendu minimume ok el tiaj nomoj, krom la fundamenta vorto, ĝis 15. de Septembro. Agrablan someran ripozon!

SOLVO DE LA

ROMBO

EN LA

PASINTA NUMERO

A  
I N O  
I Z O L A  
A N O N I M A  
O L I V O  
A M O  
A

La rivero Jordan estas la plej zigzaga, ĉar ĝi havas 395 kilometrojn da longeco por trakuri tutan distancon de 111.

La papago estas la besto, kiu pli atentas kaj -kredeble- ŝatas la muzikon.

La karbo konserviĝas tre bone sub la akvo, precipe se la akvo estas mara.

La pomoj poluras kaj purigas la dentojn

## NE ESTAS PERMESATE...

Juneta kanguruo amikiĝis kun crinaco. Iutage, la kanguruido ekskursis kun sia patrino. Sidante en ŝia poŝo, li multe ĝuis, ĉar ili ambaŭ tre agrable promenis tra bela pejzaĝo. Subite, la ido rimarkis sian amiketon kaj ekvokis lin. «Ho, ne, nef!» diris la patrino, «ne estas permesate, ke via amiketo kuniru!»

TON DE QUAASTENIET

Vinkel (Nederlando)

Internaciaj feriaj Esperanto-kursoj estas aranĝataj de G. E. E. (Instruista Fako de Unuiĝo Esperantista Franca) por 1952. Eksterlandanoj estos kiel kutime tre ●● bonvenaj; ili elektu la periodon, laŭ kapablo kaj dato, de propra ferio ●●

15 Julio - 4 Aŭgusto. *Somera Lernejo kun komenca, daŭriga, perfektiga kursoj per Esperanto. Precipe—ne ekskluzive—por instruistoj.*

5 - 17 Aŭgusto . . . *Simila aranĝo por ĉiaj profesiuloj.*

18 - 31 Aŭgusto . . . *Seminario. Por pli spertaj esperantistoj. Komencantoj ne akcepteblaj. Paroladetoj, debatoj, reciproka informado, k. t. p.*

Cetere, oni laboros pri aranĝado de esperantaj festoj, arto rakonti, deklami, ludi teatraĵon. Oni laboros dum mateno, ripozas, promenos, ludos en la parko aŭ ekskursos posttagneze. Distraj vesperoj, 1-2 tuttagaj ekskursoj.

Detaloj sendotaj de F-ino Jeanne Dedieu, 3 rue Arzac, TOULOUSE (Francio)

Al ĉiu petinto, respondkuponon dezirata.

**BAGATELARO**, de Johan Hammond Rosbach.  
Eldonis Esperantoforlaget S/A, Oslo, 1951.  
174 paĝoj. - Prezo ne montrita.

Ekde kiam mi apertis ĝin, ekplaĉis al mi la klasikaj motversoj, kiujn Rosbach elektis por meto ĉe la sojlo de sia unua libro, *Bagatelaro*. Malrapide kaj ŝate mi legis poste la novelaron. Kiam mi finis, mi sentis, ke iam estonte mi ĝin relegos, kio ne ofte okazas al mi, ĉu pro tempomanko—mia jam, ho vel, kronika rekan-taĵo—; ĉu pro alio, kvankam mi estas nekuraĉebla legemulo de esperantaĵoj.

La lingvaĵo de Rosbach, eĉ se ne tre novajema, estas kontraŭe kristale klara, senpere tuj kaptebla, tiel, ke la libro legiĝas kvazaŭ rakontaro el plej konata kutima literaturo en propra hejma lingvo; kaj tio, laŭ mia vidpunkto, estas elstara tre promesa traĵto ĉe unua elpaŝo de verkisto. Pli ol la cetero, streĉe kaptis min kelkaj opaj argumentoj, el kiuj nun reliefiĝas en mia memoro *Bagatelaro* (kiu donis nomon al la kolekto), *Mozaiko*, *La fenestro*, sed ĉefe *Anna Maria* kaj *Teorio kaj praktiko*, ĉi lasta pli ol kiu ajn alia el la libro. Ni, esperantistoj, povas nur ĝoji, ke ni havas tian noveliston inter ni. Kaj mi ne dubas, ke li same sukcesos, kiam li decidis doni al ni sian unuan romanon. Ĉar ŝajne lia vojo estas sur la rakonta, proza beletro, se oni juĝas laŭ la specimenaj poemoj, kiujn li donis tie kaj tie en sia volumo: tiujn mi trovis nesukcesaj, eĉ en la celita apologara temo, kiu kutime en plej diversaj literaturoj estas senpretenda, ne altfluga genero.

Inter aliaj trafik lingvokreaĵoj, estas por mia sento la vorto *ĝisrevido*: «La fremdulino ĝentile diris sian ĝisrevidon», unu el la elstaraj, pro tio, ke ĝi donas al nia lingvo tute klaran, trafan kunmeton el propra leksikona trezoro por *adiaŭo*, etimologie kaj fonetike ne al ĉiuj plaĉa idiomaĵo. *Korsaltigi* (= hisp. *sobresaltar, estremecer*) estas alia trafa kunmeto; kaj ĉi ambaŭ ekzemploj, kaj multaj aliaj citeblaj se la spaco permesus, pravas, ke Esperanto lerte manumita elkapablas ĉion.

La volumo, kvankam preseraroj iom ĝenas, estas belaspekta, nete presita, plaĉe aranĝita. Antaŭmeto de neologismoj, kun sufiĉe elvolvita ekspliko, estas bone pravigebla novaĵo. La libro estas ĉiel salutinda, brile atestanta vivon kaj sanon en nia lingvo; kaj samtempe, ĝi tre esperige heroldas rakontajn talentojn de novaŭtoro, kiu ja estas pozitiva espero por nia origi-nala beletro.

**J. RÉGULO PÉREZ**  
Kanariaj Insuloj

**KIEL AŬTODIDAKTO AL PEDAGOGIA SCIENCO**, de Klemenž Wiczerek. Komisiita eldonejo: Limburger Vereinsdruckerei, Limburg-Lahn, Germanujo. 40 paĝoj 21 x 14 5 cm. Prezo 1'80 gm. plus 10 % por sendkostoj.

Verketo pri la edukado, en kiu la aŭtoro citas diversajn pensojn kaj regulojn de filozofoj kaj edukistoj kaj proprajn opiniojn pri la volo, la animo de infano, k. t. p. Li montras ankaŭ siajn vidpunktojn pri la rolo de Esperanto, kiel kulturfaktoro, videble influatajn de la t. n. humanismo, kiu anstataŭ baziĝi sur la instruado de la socia scienco, baziĝas sur la instruado de literaturo kaj lingvoj. Pri la jenaj pensoj: «Esperanto estas la sola taŭga ilo por solvi la problemon de la komuna interkompreno kaj reunuigo de la homaro» (p. 25) kaj «Unu el la plej gravaj ŝtupoj de la pedagogio estas la fremdlingvo» (p. 39), oni povas aserti, ke lingvo estas nur komunikilo de ideoj kaj Esperanto estas helpilo por solvi la internacian problemon kreitan de la diverseco de lingvoj. Sed la sperto mem konvinkis la homojn, ke komuna lingvo ne havigos al ili pacan reunuigon, se oni ne forigas antaŭe, nacie kaj internacie, la ekonomiajn kaŭzojn de disigo, mizero, malkonfido, ribelo kaj milito.

**LA VOJO AL DAŬRA PACO KAJ ĜENERALA PROSPERO**. 4-paĝa faldfolio pri tiu interesa temo, havebla senpage de «International Union for Land Value Taxation and Free Trade»: 4 Great Smith Street, London, S. W. 1, (Anglujo).

Tiu deklaro de principo kaj agadplano, kiun alprenis la Unuiĝo en sia lasta Internacia Kongreso, devus esti konata de ĉiu pensanta homo, ĉar ĝi entenas, kun la natura bazo, sur kiu nia civilizacio povus normale progresi, la individuajn kaj sociajn rajtojn, kiujn, en sia lasta Deklaracio pri la Homaj Rajtoj, la Unuiĝitaj Nacioj-Organizaĵo bedaŭrinde forgesis.

**JOSÉ ANGLADA** (Barcelono)

**JARLIBRO DE U. E. A. 1952 - UNUA PARTO**. Eldonis Universala Esperanto-Asocio (Heronsgate-Rickmansworth (Herts.) Anglujo. Neaĉetebla, sed ricevebla nur de individuaj membroj de U. E. A.

La lasta volumo de ĉi tiu Jarlibro, aperinta jam en la unuaj monatoj de la jaro, por plenumi frue sian celon, enhavas interesajn informojn pri la tuta movado: Esperantistaj aranĝoj kaj kongresoj en 1952; eldonejoj, libroj kaj gazetoj, krom la kutimaj listoj de delegitoj, fakaj asocioj k. c. Entute, konvena volumo ne nur por la membroj, sed ankaŭ por ĉiu esperantisto.

**ERNESTO HURTADO**

# ★ LA LERNEJO

Responde al kelkaj samideanoj, kiuj sin montris interesataj rendevui min, dum nia venonta Kongreso, por demandi min pri siaj duboj, rilate lingvajn aferojn, mi promesas al ili, ke mi tre volonte babilos kun ili, dum ni sidos antaŭ plenaj glasoj da biero, kio estos multe pli agrable ol fari tian laboron tute sola, en la hejmo, kun la sola akompano de skribmaŝino. Sed mi petas al miaj afablaj korespondantoj, ne ŝvitigi min per tro komplikaj demandoj, ĉar mia fako nur rilatas al facilaj lingvaj aferoj: el tiuj, kiujn oni kutimas instrui en ĉiunagradaĵaj lernejoj. Pri superaj demandoj, oni prefere sin turnu al la multkilogramma Prezidanto de nia Federacio aŭ al la malpeza, ŝvebanta, fadensimila, malgranda Legema Koboldeto; krome, la seivolemuloj havos grandan avantaĝon kaj ŝparos monon babilante kun ili, ĉar tiuj superaj lingvokompetentuloj nek trinkas, nek fumas...

Ĉi tie, mi tre dankas al la Esperanta Turista Komisiono de Stockholm, pro la por mi tiom valora donaco, sendita al mi pere de la simpatia, agema, ĝentila samideano S-ro Roland Dupuis, okaze de la vojaĝo de la esperantista sveda grupo al nia lando. Mi per tiu donaco deziris montri sian dankon pro la etaj servoj, kiujn mi faris al ili, en rilato kun la organizado de tiu vojaĝo. Elkoran kaj varman—jes, varmegan!—saluton mi sendas al ĉiuj.

JUAN BOSCH.

## PARA NUESTRO BOLETIN

(Donativos correspondientes a JULIO 1952)

Suma anterior .....	2.547 Ptas.	
J. Bremón - Barcelona .....	10	>
V. Perles Moncho - Mirafior .....	5	>
Esperanto-Grupo - Sabadell .....	29	>
Emilio Prades - Valencia .....	10	>
Angel García - Bilbao .....	5	>
M. Ruiz Maza - Castellón .....	5	>
Juan Bosch - Valencia .....	25	>
Eduardo Alvarez - Guadalajara .....	5	>
Daniel Lleréns - Valencia .....	25	>
Jaime Maset - Perelada .....	5	>
Francisco Parra - Valencia .....	10	>
Alex. Revalo - Villeurbanne .....	10	>
L. Friis (caravana danesa) - Aabyhøj .....	229	>
Total .....	2.920	>

Con un resultado bastante satisfactorio, hemos llegado al descanso estival. ¡A recuperar energías! ¡Felices vacaciones a todos!

## NASKIĜO

Granda ĝojo regas en la esperantista hejmo de niaj ĝeamikoj Arquimedes Ballester kaj Trinidad Torregrosa, de Alcoy, pro feliĉa naskiĝo de bela filineto, kiu certe iam balbutos en Esperanto oportune siajn unuajn parolojn.  
Koran gratulon al la simpatia trio!

## ANONCETOJ

Ni akceptas anoncetojn kiuj rilatas al nia afero. Unu peseto aŭ unu r-k. validas por du vortoj. Tri mallongigaj literoj valoras kiel unu vorto. Aparta tarifo por specialaj anoncoj.

J. Juan Forné, str. Martí, 3 - Valencia (Hispanio) deziras aĉeti malnovajn jar-kolektojn aŭ unuopajn ekzemplerojn de «Kataluna Esperantisto» kaj katalunajn kongreslibrojn. Mi pagos laŭdeziro, ĉu per pesetoj ĉu per esperantajtoj.

## POŝTMARKKOLEKTANTOJ

Via revueto estas «La Filatelisto»  
Petu sciigojn al S-ro Jules Coste  
Cité du Moulin de Senlin

MONTGERON ♦ (S & O) Francio

Legu la faman verkon

SANGO KAJ SABLLO  
de V. Blasco Ibañez

tradukita de Ramón de Salas

Tre interesa romano pri la hispanaj taŭroludoj

Prezo 30 pesetoj, afrankita. Petu ĝin al  
LIBROSERVO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO  
Hernán Cortés, 18 — VALENCIA

«Radio Moyá» ha iniciado la difusión de un programa «El mundo es un pañuelo», con noticias sobre Esperanto que transmitirá todos los Jueves, a las 21'30, hora española.

También en «Radio Tarragona», nuestro entusiasta amigo J. M. Giliell prepara regularmente un interesante programa, acerca del Esperanto, todos los Jueves, desde las 20 a las 20'15, con onda de 191 metros.

## GRAVA ATENTIGO

Kiel kutime, pro somera libertempo de la redaktoroj, dum monato Aŭgusto, nia Bulteno **NE** aperos. La proksima numero, kiel eksterordinara kongresa numero, kun densa kaj elektita enhavo, ne vizitos vin denove ĝis mezo aŭ fino de venonta Septembro. Bonvolu atenti pri tio!  
Agrablan ripozon al ĉiuj!